

## Respondo al leteroj venintaj el 41 landoj, 2.

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI, 1988 januaro 14 kaj 16

<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-1988-006/SRI-1988-006-A-3-Claude-kaj-Andree-GACOND-Respondo-al-leteroj-venintaj-el-41-landoj-2.mp3>

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond nome de Svisa Radio Internacia. Por la dua semajno ni salutas niajn skribemajn geaŭdantojn. En nia leterkesto troviĝas poŝtkartoj, leteroj kaj aŭdraportoj el 41 landoj, kiujn ni listigu :

Argentino, Aŭstralio, Aŭstrio, Belgio, Brazilo, Britio, Ĉeĥoslovakio, Ĉinio, Danlando, Finnlando, Francio, Germanio Okcidenta, Germanio Orienta, Gvineo Bissau, Hispanio, Hungario, Irano, Islando, Israelo, Italio, Irano, Japanio, Jugoslavio, Kanado, Kubao, Latvio, Meksikio, Nederlando, Niĝerio, Nikaragvo, Norvegio, Pollando, Portugalio, Sovetio, Srilanko, Svedio, Svislando, Svedio, Usono, Vatikano kaj Venezuelo.

Pasintsemajne ni salutis la geaŭdantojn el Argentino, Aŭstralio, Aŭstrio, Belgio, Brazilo kaj restis en Britio.

A.- Henry PALMER en Somerset raportas ne nur pri la kaptitaj elsendoj, sed ankaŭ pri malhelpoj regule kapti nin. Ni citas: "Ĉar la esperanto-elsendoj daŭras tiel mallonge, ili ofte finiĝas antaŭ ol oni konsciiĝas, ke estas la horo por aŭskulti ilin. Aŭ iu telefonas ĝuste, kiam ili komenciĝas. Aliaj aferoj malhelpas aŭskultadon. Ekzemple la vintra kaj somera horsistemoj estas enkondukitaj je malsamaj datoj en Britio kaj Svislando, kaj se oni ne regule aŭskultas, poste oni bezonas kelkajn provojn por trovi la ĝustan horon." Kaj li esprimas dezirojn aŭ esperojn: "Mi ŝatus aŭdi mallongan novaĵbultenon pri mondaj aferoj, eĉ komenton, ĉar Svislando havas neŭtralan sintenon. Ĉu estas pro la granda kaj rapida traduklaboro necesa, ke oni ne krome elsendas tian eron?" Fakte estas pro la mallongeco de la elsendoj. Esperanto disponas fakte je nur po 3 dekminutaj elsendoj en la semajno, kaj ni donis la preferon al kultura enhavo aŭ raportoj pri aferoj ne rekte ligitaj al eventoj.

Cl.- Ĉiam en Britio, s-ro PALMER en Reading ekstudas esperanton kaj trovas helpon en niaj elsendoj.

A.- Walter kaj Alice PEAKE en York, kiuj interesiĝas pri la naturo kaj ankaŭ la vivmaniero de la ordinaruloj, estas tre regulaj aŭskultantoj. Ili konkludas poŝtkarton dirante: "Svisa Radio Internacia dum longa tempo laboradas por helpi la disvastigon de esperanto, kaj ni ŝuldas multon por la laborado de gesinjoroj BAUR kaj GACOND."

Cl.- Ray STOVIN en Londono eklernas esperanton.

A.- El Ĉeĥoslovakio skribis Josef CHVOSTA en Poděbrady.

Cl.- František HAVLIK en Hodonin sendis salutvortojn el esperanto-kongreso okazinta en Olomouc. Lian poŝtkarton kun surskribo en esperanto ni konservas en la dokumentejo Centro de Dokumentado kaj Esploro pri Lingvo Internacia, aŭ CDELI, en la Biblioteko de la Urbo La Chaux-de-Fonds.

A.- Karel KRAFT en Borotice skribas: "Al mi plaĉas viaj priliteraturaj programoj, en letero, kiun ni grandparte citos.

Cl.- Li diras : Al mi placas viaj priliteraturaj progranoj. Pasintsemajne tre kompetente vi emisiis programon pri Friedrich Dürrenmatt. Ĉi tiun sabaton min kaptis via aprezo de la verkoj de Karolo Piĉ. Via recenzo iom tro diferenciĝas de la pritakso, kiun mi plurfoje spertis. Ekzemple, la unuan semajnon de ĉi tiu monato mi partoprenis terminologian kurson en Roudnice, Ĉeĥoslovakio, kaj tie oni tre akre kritikis lian verkaron.

Simile skribis mia australia amiko Trevor Steele, aŭtoro de la aperanta, aŭ aperonta verko "Sed nur fragmento". Sendube konas La Litomiŝla Tombejo-n de Karel Piĉ kun ĝiaj multaj ak, antem, nam, forsin, ktp. La enhavo estas sufiĉe interesa, sed mi ne konsentas, ke tiaj novismoj necesas. Piĉ dediĉas iom longan apologion al defendo de siaj "plibonigoj". Li eĉ asertas, ke manko de tiaj vortoj kulpas pri la neevoluinteco de nia prozo. Mi ricevas la impreson, ke Piĉ elektis sen neceso la rolon de idiosinkrazia elpensanto kaj tre sin kompatas pro tio, ke aliaj ne nubtenas lin."

Plej akre kondamnis Karlon Piĉ Trevor Steele kaj ankaŭ kelkaj niaj amikoj pro lia lasciva prezentado de la rilatoj inter viro kaj virino, pli bone pro lia tre strikta limigo al ĉi tiuj lascivaj rilatoj. Tion mi ne diras por disputi kun vi. Mi daŭre alte taksas viajn priliteraturajn programojn, mi nur volas modeste atentigi vin, ke ekzistas ankaŭ kontraŭaj opinioj, iam eĉ multe pli akraj, ol mi ĉi tie esprimis. Tutkore via Karel Kraft.

A.- Ĉiam el Ĉeĥoslovakio, ni salutas Jirina KUBIKOVA en Velke Koralitice.

Cl.- Jiri LAUBE en Roudnice obeis niajn alvokojn ne nur anonci okazintaĵojn, sed ankaŭ raportoj pri okazintaĵoj. Li sendis al ni raporton pri terminologia kurso, kiu disvolviĝis en lia urbo. Jen, dum la restanta tempo de tiu ĉi elsendo ni citos la komencon el tiu dokumento, kiu montras, kion oni faras en Ĉeĥoslovakio.

Terminologia kurso okazinta ekde la 1-a ĝis la 5-a de septembro, en Rudnice, estis plua grava ŝtupo al pli vasta uzado de esperanto en sciencaj kaj teknikaj tekstoj. Jam pli ol 80 jaroj ekzistas klopodoj krei fakajn tekstojn kaj evoluigi fakan lingvaĵon en esperanto. Multe da laboro estis farita pere de diversaj unuopuloj, revuoj kaj institucioj. Grava paŝo estis la fondo de Scienca Eldon-Centro en Budapeŝto post interkonsento de UEA kaj HEA en 1981. Jam ekde la tempo de Wüster oni sentis bezonon de sistemeca terminologia laboro. Tial, baldaŭ post la fondo de SEC estiĝis en Budapeŝto ankaŭ terminologia sekcio de scienca teknika sekcio, kunlaboranta kun la Terminologia Centro de UEA, Rüdiger Eihholz en Kanado, kaj Akademio de Esperanto. Fine de 1982 okazis en Bad Saaro, en GDR, seminario pri apliko de esperanto en scienco kaj tekniko. En ĉi tiu seminario estis diskutataj bazaj principoj por la terminologia laboro, prezentitaj de inĝeniero Jan Werner kaj aliaj membroj de scienca-teknika sekcio de ĉeĥa kaj slovakaj esperanto-asocioj. Surbaze de ĉi tiu principaro disvolviĝis pli vasta kampanjo, gvidata de Vera Dehler-Blanke.

La reston de tiu letero ni konservos por tuta elsendo.

A.- La venontan semajnon ni daŭrigos nian salutadon de la skribemaj geaŭdantoj. Parolis nome de Svisa Radio Internacia gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond, kiuj diras : Ĝis reaŭdo!

---

*Kopirajto © Claude GACOND [www.esperanto-gacond.ch](http://www.esperanto-gacond.ch)  
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), januaro 2014*